# La Hodiaŭa Ĵurnalo

2018-01-20 n-ro 422


# Lumiĝantaj kreskaĵoj - estontaj lumfontoj surstrate kaj hejme




Registaro: Militista ĉeesto de Usono en Sirio estas kontraŭleĝa

Ĉefo de UN avertis pri pliiĝanta minaco de amasdetruaj armiloj

Universitato de la tria aĝo

**La Hodiaŭa Ĵurnalo**

Ĉiutaga publikaĵo kun novaĵoj, aktualaĵoj kaj diversaĵoj – pri la mondo, scienco, socia vivo kaj Esperantujo.

**Misio**
Prezenti interesajn ĉiutagajn publikaĵojn por oportuna legado

Redaktoro
kaj grafikisto: Rafael S. Lima
Revizianto: Andrej A. Peĉënkin [Андрей А. Печёнкин]

**Kontakto**
hodiauajurnalo@gmail.com

*Sendu viajn aktualajn novaĵojn, en Esperanto, kaj vi verŝajne trovos ilin en la ĵurnalo.*

La redakcio ne nepre subtenas iujn enhavojn aŭ samopiniajn kun ties aŭtoroj.

*Elŝutu la dosieron, la fontoj, la ligiloj kaj la enhavlisto estas alklakeblaj.*

Farita per: Scribus

Ĉefo de UN avertis pri pliiĝanta minaco de amasdetruaj armiloj
*La plej alta nivelo de post la Malvarma Milito p. 03*

Palestino alvokas Eŭropan Union savi procezon de Palestina-Israela paco
*Protekti la fundamentajn principojn pri realigo de Palestina-Israela paco p. 03*

Registaro: Militista ĉeesto de Usono en Sirio estas kontraŭleĝa
*La Siria registaro ne bonvenigas Usonon partopreni en ĝia rekonstruado p. 04*

Siria registaro konfirmis sian ĉeeston ĉe viena intertraktado
*En Vieno p. 04*

Pollando: manifestacio kontraŭ la rigidigo de la leĝo pri abortigo
*Parlamento voĉdonos favore al la striktiga projekto p. 05*

Monda Tago de Migranto kaj Rifuĝinto
*Konscio pri la farata helpo p. 05*

Lumiĝantaj kreskaĵoj - estontaj lumfontoj surstrate kaj hejme
*Kreskaĵoj aŭ eĉ arboj povas briligi nian mondon estontece p. 06*

Universitato de la tria aĝo
*Ekde la jaro 1987 p. 07*

Sultano gajnis replikon de Flintstones-veturilo
*Ibrahim Sultan Iskandar, de Malajzio p. 08*

Hodiaŭe
*Johannes V. Jensen; kaj Serpento p. 08*

## Ĉefo de UN avertis pri pliiĝanta minaco de amasdetruaj armiloj

Ĝenerala sekretario de UN, António Guterres, ĵaŭde [18 jan 2018] avertis, ke minacoj de amasdetruaj armiloj ŝajne kunigas fortojn en la nuna mondo.



Guterres diris al la Sekureca Konsilio de UN, ke la tutmondaj maltrankviloj pri nukleaj armiloj estas sur la plej alta nivelo de post la Malvarma Milito. Ĉi tiuj minacoj inkluzivas, ke la fido pri nukleaj kaj aliaj demandoj inter Usono kaj Rusio daŭre malfortiĝas; la Irana nuklea interkonsento estas pridubata; la uzo de kemiaj armiloj en Sirio serioze defias la tutmondan tabuon kontraŭ ĉi tiuj amasdetruaj armiloj.

La ĝenerala sekretario rimarkigis, ke la minacoj de amasdetruaj armiloj kaj iliaj transportrimedoj okazas en la medio de pliiĝantaj militaj buĝetoj kaj la troa akumuliĝo de armiloj, kaj ili kuniĝas kun serioza kresko de regionaj streĉoj.

Yu
Ĉina Radio Internacia

---

## Palestino alvokas Eŭropan Union savi procezon de Palestina-Israela paco

Ĝenerala sekretario de la Plenuma Komitato de la Palestina Liberiga Organizo Saeb Erekat alvokis la Eŭropan Union preni sur sin respondecon savi la procezon de Palestina-Israela paco.



Erekat faris la alvokon dum renkontiĝo kun delegitoj de membroŝtatoj de la EU al Palestino ĵaŭde [18 jan 2018] en la urbo *Ramallah*. Li diris al raportistoj post la renkontiĝo, ke li alvokis la EU preni efikajn kontraŭrimedojn kaj agojn por protekti la fundamentajn principojn pri realigo de Palestina-Israela paco. Li klarigis, ke tiuj principoj inkluzivas la "du-ŝtatan solvon" kaj la fondon de sendependa Palestina ŝtato kun Orient-Jerusalemo kiel la ĉefurbo surbaze de la landlimoj de la jaro 1967.

Erekat diris, ke Palestino esperas akiri helpon de la EU por plenigi la grandan breĉon, kiun kaŭzis la redukto de usonaj monhelpoj al Palestino kaj la Agentejo de la UN pri Helpo kaj Konstruo por Palestinaj Rifuĝintoj en Proksim-Oriento. Li aldonis, ke la frostigo de la monhelpo akrigos la lokan malriĉecon, ekscitos ekstreman pensadon kaj kondukos la regionon kaj eĉ la mondon al daŭra malkvieto kaj milito.

Yu
Ĉina Radio Internacia

# Registaro: Militista ĉeesto de Usono en Sirio estas kontraŭleĝa

La Siria Ministerio de Eksterlandaj Aferoj diris ĵaŭde [18 jan 2018], ke estas kontraŭleĝe la militista ĉeesto de Usono en Sirio, kaj la Siria registaro ne bonvenigas Usonon partopreni en ĝia rekonstruado.



Usona ŝtatsekretario Rex Tillerson diris merkrede [17 jan 2018], ke Usono konservos sian militistan ĉeeston en Sirio. La siria Ministerio de Eksterlandaj Aferoj diris en deklaro responda al Usono, ke la militista ĉeesto de Usono en Sirio malobservas internacian leĝon kaj atencas Sirian suverenecon, kaj ĝia vera intenco ne estas elimini la ekstremisman grupon Islama Ŝtato, sed estas ŝirmi ekstremismajn grupojn.

La deklaro diris, ke Usono alportas al Sirio nur sangadon kaj suferon, kaj Sirio absolute ne povas inviti Usonon partopreni en sia rekonstruado. La deklaro akcentis, ke la rekonstruado de Sirio ne bezonas eĉ unu cendon da usona dolaro, ĉar ĝi estas makulita per la sango de la siria popolo. La deklaro aldonis, ke ajna politika solvo de la siria demando devas respondi al la apelacioj de la siria popolo, sed ne estas por realigi komplotojn kaj interesojn de eksteraj fortoj.

Yu
Ĉina Radio Internacia

# Siria registaro konfirmis sian ĉeeston ĉe viena intertraktado

Ramzy Ezzeldin Ramzy, speciala vicsendito de la ĝenerala sekretario de UN pri Sirio, diris ĵaŭde [18 jan 2018] en Damasko, ke la Siria registaro ĉeestos la intertraktadon pri la siria demando, kiu okazos ĉi-monate en la Vieno.



Ramzy diris tion en gazetara konferenco post renkontiĝo kun Siria Vicministro pri Eksterlandaj Aferoj Faisal Makdad. Li diris, ke la Siria registaro jam konfirmis sian ĉeeston ĉe la viena intertraktado. Li esprimis esperon, ke ambaŭ la siria registaro kaj la opozicio ĉeestos la intertraktadon en pozitiva kaj konstruema maniero, ĉar sukceso de la Viena intertraktado helpos sukcesigi la nacian dialogon, kiu komenciĝos en la fino de tiu ĉi monato.

Staffan de Mistura, speciala sendito de la ĝenerala sekretario de UN pri Sirio, diris merkrede [17 jan 2018], ke li jam invitis la sirian registaron kaj la opozicion sendi delegaciojn al la speciala intertraktado kune kun delegacio de UN en Vieno de la 25-a ĝis la 26-a de januaro. La intertraktado iros en la kadro de la Ĝeneva intertraktado kaj fokusiĝos pri temoj koncernaj al revizio de la Konstitucio.

Yu
Ĉina Radio Internacia

# Pollando: manifestacio kontraŭ la rigidigo de la leĝo pri abortigo




Signe de batalo, la manifestaciantinoj ŝminkis siajn okulojn per nigraj strekoj, kiel faras la soldatoj en armeo. Anna, tridekjara, fariĝis vigla aktivulino favore al la rajto al abortigo, de kiam la regantaj konservativuloj provis tute malpermesi ĝin en 2016.

«Estus pli facile paki miajn bagaĝojn, kaj forlasi tiun landon, kiun mi ŝatas, kaj kie mi naskiĝis, sed mi ne rezignos», diras Anna.

Male, laŭ Karolina, 19-jara, elmigrado estas tre serioza opcio. «Mi ne imagas min vivadi en lando, kiu senigas min de la fundamentaj rajtoj. Mi enmigros en landon, kiu ofertos al mi pli bonan vivon, ekzemple en Benelukson aŭ Skandinavion», diras Karolina.

Okaze, se la Parlamento voĉdonos favore al la striktiga projekto pri abortigo, polinoj povos laŭleĝe abortigi nur kiam ilia vivo estas en danĝero, aŭ se la gravedeco rezultas el seksperforto aŭ incesto. Laŭ Adrian Zandberg, maldekstra gvidanto, tio estas barbareco. «Tio, kion la deputitoj de la PiS kaj la fundamentismaj religiuloj deziras enkonduki en Pollandon, retroirigas nian landon al la 19a-jarcento».

Pro la absoluta plimulto de la konservativuloj en la Parlamento, tiu projekto estos sendube aprobita.

Neniam Milito Inter Ni

# Monda Tago de Migranto kaj Rifuĝinto



Lastdimanĉe [14 jan 2018] pasis Monda Tago de Migranto kaj Rifuĝinto. La tago fariĝis do la okazo por tiucela kvestado [peto pri mona subteno] kaj altigo de la konscio pri la farata helpo. *Caritas Polska* [Pola karitato] liveras sisteme helpon al rifuĝintoj en Sirio, Libano, Jordanio, Irako, Palestina Aŭtonomio. La unuaj rimedoj en 2012 estis transdonitaj por helpi al rifuĝintoj el Sirio. Unu jaron poste tri mil infanoj el Damasko, *Hawran-Dara* kaj *Homs* ricevis festajn pakaĵojn.

Ekde 2018 *Caritas* subvencias Medicinan Centron Bab Sharki en Damasko. Ĝis la fino de decembro la funkciado de la centroj estis kromfinancata el la Eŭropa Fondaĵo por Azilo, Migrado kaj Integriĝo administrata de la Pola ministerio por la internaj aferoj. Tiun taskon en 2018 transprenis *Caritas Polska,* kiu por integrigaj programoj destinas pli ol 9,6 milionojn da zlotoj. La plej granda kampanjo de *Caritas Polska* helpanta al rifuĝintoj estas la programo „Familio al Familio" inaŭgurita en oktobro 2016. La subteno celas personojn loĝantajn en Sirio, siriajn rifuĝintojn en Libano kaj libananojn vivantajn en mizero pro la migrokrizo. Ĝis nun tiun helpon utiligis pli ol 7 mil familioj en Sirio kaj Libano.

Pola Retradio

# Lumiĝantaj kreskaĵoj - estontaj lumfontoj surstrate kaj hejme

Lumantaj kreskaĵoj povas ŝajni fantaziaĵo, sed teamo de esploristoj el MIT kreskigis akvokreson, kiu ellasas malfortan lumon dum preskaŭ kvar horoj. La esploristo Seon-Jeong Kvak gvidis la teamon de inĝenieroj kaj sciencistoj por enigi en la kreskaĵojn la saman substancon, kiu lumigas lampirojn. La profesoro de MIT Mikael Strano diris, ke "La ideo estas krei kreskaĵon, kiu povas funkcii kiel surtabla lampo - la lampo, kiun vi ne bezonas ŝalti. La lumo estas ellasata pro metabola energio de la kreskaĵo mem."



Lumantaj kreskaĵoj aŭ eĉ arboj povas briligi nian mondon estontece danke al ĉi-esploro. La kreskaĵoj lumas pro la specifa enzimo, nomiĝanta luciferazo. Ekzakte tiun-ĉi substancon enhavas lampiroj.

Luciferazo influas molekulojn de luciferino por ellasi lumon. La teamo kunmetis tiujn ĉi komponantojn en nanodimensiajn ujojn por liveri ilin ekzakte en ĝustan parton de la kreskaĵo. Sciencistoj ankaŭ montris, ke eblas ĉesigi lumiĝadon aldonante inhibanton de luciferazo, do estas ideo pri kreado de kreskaĵoj, kiuj ĉesas lumiĝi responde al ekzaktaj kondiĉoj, ekzemple kiam aperas sunlumo.

Antaŭaj eksperimentoj pri kreado de lumellasantaj kreskaĵoj celis ĉefe genan ŝanĝon de kreskaĵoj por igi ilin produkti luciferazon memstare, sed tia ĉi maniero postulas tre multe da laboro por ricevi tre malfortan lumon. Kaj cetere ĉi-maniero ofte estas limigita per unu ekzakta tipo de kreskaĵo.

La nova ellaboraĵo de MIT aplikeblas por ajna kreskaĵo. Do, sciencistoj demonstris tion je akvokreso, brasiko, spinaco kaj tiel plu. Ili ankaŭ esperas, ke eblos ŝpruci al kreskaĵoj per nanokomponantoj en la sekva etapo de la esploroj. Do, arboj kaj kreskaĵoj povos servi kiel lumfontoj.

La ĵurnalo *Nano Letters* publikigis la esploron enrete novembre [2017]. Sciencistoj el la Universitato de Kalifornio Riversajdo kaj *Berkli* kontribuis la laboron.

Kirill Noviĉenko
Interalie

# Universitato de la tria aĝo

De tridek jaroj la projekto "Universitato de la tria aĝo" logas altaĝulojn en la aŭditoriojn.



La universitato de la tria aĝo en Ĉeĥio funkcias ekde la jaro 1987. Ĝi komenciĝis en la fakultato pri ĝenerala medicino en Prago. Kiel modelo por universitato por altaĝuloj servis franca kleriga institucio kiu estis fondita en la jaro 1973 de la universitata profesoro Pierre VELLAS en Tuluzo.

La realigo de la ideo en Ĉeĥio kostis kompreneble multe da tempo kaj peno. Finfine en oktobro de la jaro 1987 eblis oferti specife por altaĝuloj studadon kun la nomo "La biologio de la homo".

Tio okazis ankoraŭ dum la komunisma epoko. Necesis por tio multe da kuraĝo ĉar la komunismaj regantoj ne vidis sencon investi en la klerigadon de altaĝaj civitanoj. La situacio en Francio estis tiam alia. Tie pro sociala reformo multaj homoj estis senditaj al frua pensiuleco por liberigi laborlokojn por pli junaj homoj. Kaj por kompensi tion tiuj frupensiuloj ricevis por pasigi la tempon la eblecon plukleriĝi.

En Ĉeĥio regis aliaj motivoj. Oni volis revenigi la altaĝulojn al la lernejaj benkoj unuavice pro tio ĉar multaj el ili dum sia junaĝo ne povis ricevi supran kleriĝon. La situacio estis iom pli bona en la urboj, sed estis esence pli malbona en kamparaj regionoj. En la jaro 1987 ankaŭ homoj sen maturec-ekzameno ricevis la eblecon enskribiĝi en la unuan studjaron de la universitato de la tria aĝo.

Estis entute 369 altaĝaj gestudentoj. Tamen la tiam nova kleriga institucio en Prago ne estis la tutunua tiuspeca en la lando.

Post la fino de la komunisma regado en la jaro 1989 la oferto pri pluklerigo por altaĝuloj ene de malmultaj jaroj multobliĝis. Hodiaŭ ĉiujare en la tuta lando miloj da sciemuloj povas ĝui la eblecon elekti studfakon laŭ propraj individuaj interesoj, ĉu en universitataj urboj, ĉu en malpli grandaj urboj, kie la koncerna "patrina" universitato funkciigas filion por tiu celo. Oni tie ofertas ankaŭ lingvokursojn.

Jam kelkajn jarojn antaŭe estis fondita en la moravia urbo *Přerov* ['pr̝ɛrof]] la tiel nomata "Akademio de la tria aĝo". Baldaŭ post tio ekfunkciis universitato de la tria aĝo en *Olomouc*. La konceptoj pri la programoj estis tre similaj. Temis pri kursoj kaj prelegoj.

En la teologia fakultato de Budvejso oni ofertas trejnadon de memorkapablo por altaĝuloj. La altaĝuloj ne nur interesiĝas pri la enprofundiĝo en novaj fakoj sed ili ankaŭ ŝatas konatiĝi kun gekolegoj kaj trovi novajn amikojn. Tiel la studado en la universitato de la tria aĝo ne nur plibonigas mensajn kapablojn sed ankaŭ plialtigas vivoĝojon per novaj amikaj kontaktoj.

Jarka MALÁ
Esperanta Retradio

## Sultano gajnis replikon de FLINTSTONES-veturilo

Konata kiel ŝatanto de sportaj aŭtomobiloj, sultano Ibrahim Sultan ISKANDAR de Malajzio ricevis ĉi-semajne donace modelon, kiun oni ne trovas ĉe kolektoj pri belegaj aŭtoj: temas pri repliko de tiu veturilo de la televida desegnofilma serio "*The Flintstones*".




Malsame al tiu de la desegnofilmo kreita de Hanna BARBERA, tiu donita al li ne moviĝas per piedagado de ties uzantoj, sed per propra motoro, laŭ informoj fare de la oficialaj sociaj retejoj de la azia subŝtatestro.

La donacon faris iu reganto de la regiono de Pahango, kiu estas unu el la 13 subŝtatoj, kiuj konsistigas Malajzion. Ĝi staras en la garaĝo de ISKANDAR, apud kelkaj pli modernaj modeloj de la markoj *Ferrari*, *Rolls-Royce* kaj *Bugatti*, inter aliaj.

Paulo Cesar PIRES
esperanto.blog



## Johannes V. JENSEN

**Johannes Vilhelm JENSEN - pli konata kiel Johannes V. JENSEN - (naskiĝinta en *Farsø*, en Norda Jutlando, la 20-an de januaro 1873, mortinta la 25-an de novembro 1950 en Kopenhago), estis dana verkisto. En 1944 li ricevis la Nobel-premion pri literaturo.**

**Vikipedio**



## Bildo de la tago

*Eutropis macularia*

**manĝante bufon.**

**Vikipedio**